

## & Husaro:

< Rekante 23 el 43 batoj por strofo, entute 1247 paŝoj dum 14 minutoj. Verkis Puŝkin?. El rusa tradukis ? Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<1,5:43> (/do dore doTi LaSo dodo; so sola sofa mire soso; do dore doTi LaSo dodo; so sola sofa mire mimi;

(#Rekantaĵo: fa faso lafa mifa somi; re refa mire domi somi; fa faso lafa mifa somi; re refa mire domi somi reTi do o))×29 )

+

### (&Strofoj:

< El Puŝkin.>

'1 Ĉevalon sian li purigis, ; Estante forte kolerega, ; Kaj diris: "min diabl' devigis ; En loko loĝi malbonega!

(×: **Vivi ĉe sino de virino ; Kun ruĝa vino kaj destino ; Drinki ĝin tage kaj sen fino ; Vivi ĉe sino de plej ĉarma la virin'.**)

'2 Ni ĉiam tie-ĉi restadas ; En turka kvazaŭ batalado ; Nur solan supon ni manĝadas ; Kaj eĉ ne pensas pri drinkado. ....

'3 Kaj mastro tie-ĉi malbona, ; Malbonan havas li edzinon. ; Nek via skurg', nekn vorto bona ; Admonas tie-ĉi virinon! ....

'4 Jen urbo Kiev! lando kia! ; En buŝon falas mem buletoj, ; Kaj vinon havas domo ĉia, – ; Kaj kiaj tie virinetoj! ....

'5 Ne estas eĉ domaĝ', je Dio, ; Sin mem pro ili pereigi! ; Malbone estas nur per tio..." ; – Per kio? Volu min sciigi! – ....

'6 Kaj li komencis plibonigi ; Lipharon. "Eble ne timulo – ; Li diris – estas vi, sed igi ; Vin miri povas mi – spertulo." ....

'7 "Aŭskultu: regimento nia ; Ĉe Dnepro larĝa enlokiĝis. ; Mastrino estis bona mia, ; Kaj tombon ŝia edz' foriĝis. ....

'8 Kun ŝi mi baldaŭ amikiĝis; Ni vivis pace, tute bone, ; Al mi mario humiliĝis, ; Ne diris vorton eĉ malbone. ....

'9 Se mi malsobra estis tute, ; Ŝi mem min zorge kuŝigadis; Ŝi ĉiam pace, sendispute ; Je ĉio tuj mem konsentadis ....

'10 Feliĉan vivon mi pasigis, ; Kaj longe tiel vivus eble, – ; Sed jen subite ĵaluzigis ; Min io, – mem diabl' kredeble. ....

'11 Mi pensis: kial baptanino ; Sin levas nokte? Kiu volas? ; Tre juna estas ŝi virino ; Kaj tial, eble, ŝi petolas! ....

'12 Mi observadi ŝin intencis. ; Jen foj' ne dormis mi (en korto ; Jam estis nokto, kaj komencis ; Bruegi vent' kun granda forto). ....

'13 Kaj vidas mi: ŝi forrampetis ; De forno, prenis ŝi karbeton, ; Min tre facile pripalpetis ; Disblovis apud forn' fajreton; ....

'14 Ŝi ekbruligis kandleton, ; Kun ĝi angulon ŝi foriĝis, ; De tie prenis boteleton, ; Sur balailon ŝi sidiĝis, ....

'15 Ŝi senvestiĝis, kaj sorbinte ; El boteleto, ŝi tra tubo, ; Sur balailo sidiĝinte, ; Tuj malaperis, kvazaŭ nuboj! ....

'16 "Ŝi eble estas sorĉistino", ; Mi pensis, kaj de forn' rapidas, ; Por vidi sorĉon de virino; Kaj jen mi boteleton vidas. ....

'17 Mi flaris: ia acidaĵo... ; Mi plankon verŝis el botelo: ; Forflugis – kia mirindaĵo! – ; Kaj forna forko kaj sitelo! ....

'18 Sub benko katon mi ekvidis, ; Sur ĝin mi ŝprucis el botelo: ; Ĝi ternis tuj kaj ekrapidis ; Subite fornon post sitelo. ....

'19 Sur ĉion ŝprucis sen kompatoj ; Jam mi per tuta forto mia, – Kaj ĉio: tablo, benko, pato ; Forflugis unu post alia. ....

'20 Al ili mi ne volis cedi, – ; Kaj trinkis mem per unu fojo ; restaĵon... Ĉu vi povas kredi? ; Mi ekaperis tuj en vojo: ....

'21 Mi flugis, – kien? mem ne sciis, ; Kun forto tranĉis nur aeron, ; Al steloj mi: "pli dekstren" kriis. ; Kaj jen ekfalas mi sur teron. ....

'22 Jen mont'. Sur ĝi kaldronoj bolas ; Kaj oni faras ian ludon: ; Kantadas, fajfas kaj petolas, ; Kun granda ran' edzigas judon. ....

'23 Mi kraĉis... Flugas jen Mario: ; "For! hejmen kuru, petolulo! ; Vin oni tuj formanĝos!..." – Kio?! ; – Nu, mi ne estas timemulo: .....

'24 Vi ne kriegu! Kie vojo ; Al hejmo estas? – "Jen sidiĝu ; Sur fornan feron, – kun malĝojo ; respondis ŝi, – kaj tuj foriĝu!" .....

'25 – Vi volas, ke husar' sidiĝu ; Sur fornan feron?! Baptanino, ; Mi petas vin, ne freneziĝu, ; Ne estu vi malsaĝulino! .....

'26 – Ĉevalon!... "Prenu, malsaĝulo!" ; Ŝi efektive diris veron: ; Jen antaŭ mi ĉeval' – barbulo ; Per hufo forte batas teron. ....

'27 Sidiĝas mi kun brava vido ; Sur ĝin kaj trovi bridon penas, ; Sed vane! Rajdas mi sen brido – ; Kaj tuj... al forno mi alvenas. ....

'28 Kaj jen mi tion saman vidas. ; Ĉevalo tute jam forestas, ; Kaj mi sur benko rajde sidas: ; Jen kia strang' okazo estas!" – .....

'29 Kaj li daŭrigis plibonigi ; Lipharon. "Eble ne timulo, – ; Li diris, – estas vi, sed igi ; Vin miri povas mi – spertulo." .....